

Joseph Freiherr von Eichendorff,

Migrado

tradukita de Manfredo Ratislavo

Kantadas enaere
Alaŭdoj, riveret'
Susuras kaj leĝere
Ekmigras la poet'.

De l' valo ĝis la monto
Floradas ĉio ĉi,
Kaj al la horizonto
Migradi volas li.

Li vokas ĉiujn, kiujn
deprimas la zorgad',
Persvadi volas tiujn
Al tiu ĉi migrad'.

Li kantas, la kantadon
Ekaŭdas kelka vir',
Kaj kelkan kamaradon
Ekkaptas hejm-sopir'.

La tuta mond' vigliĝas,
Ekmigras kun pasi';
La amatin' aliĝas,
Al li mansvingas ŝi.

...

Ek-iras homoj ĉie
jubile, kun kantad',
Ĉi tie kaj jen tie -
Nun ekas la migrad'!

*Traduko de la Germana poemo "Wanderschaft" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984-05-19.*

MR-096-1 / Arg-229-452 (2004-04-23 10:38:25)